arXiv:physics/0312013v1 [physics.gen-ph] 2 Dec 2003

Angula distanco en kaloto

A.F.F. Teixeira *
Centro Brasileiro de Pesquisas Físicas
22290-180 Rio de Janeiro-RJ, Brazil

2^a de Decembro de 2003

Abstract

A cap in a 2-D sphere is considered, smaller than an hemisphere. Two points are randomly chosen in the cap. The probability density that the angular separation between the points have a given value is obtained. The knowledge of this function is important for some methods for determining the shape of the universe.

Kaloto de 2-D sfera estas studata, pli malgranda ol duonsfero. Du punktoj estas hazarde elektataj en la kaloto. La probabla denso de angula distanco inter la punktoj estas havita. Scio de tiu funkcio estas grava por kelkaj metodoj por specifi la formo de l'universo.

1 Antaŭparolo

Tre antikva demando estas: kiu estas la formo de l'universo? Por havi respondon, precizaj observoj kaj mezuroj de kosmaj objektoj estas necesaj. Hodiaŭe, multaj plibonigoj estas okazantaj en la rilata teknologio. El pluraj aliaj, la metodo PASHpc studas angula distanco inter kosmaj objektoj de ĉiela arkaĵo [1]. Por esti vere efika, tiu metodo bezonas uzi ekzaktan formon de funkcio EPASHpc. En nia artikolo, ni findas tiun funkcion, kiun ni skribas $\mathcal{P}(\alpha, \beta)$.

2 Esprimo de problemo

Pensu pri sfero S^2 kun radio=1. Konsideru kaloton kun angula duondistanco $\alpha \leq \pi/2$ radianoj (se $\alpha = \pi$, la kaloto estus la tuta sfero). Elektu hazarde du punktojn de la kaloto. Ni demandas, kiu estas la probablo $\mathcal{P}(\alpha, \beta)\mathrm{d}\beta$ de la angula distanco inter la du punktoj havu valoron inter β kaj β+dβ. Certe $0 \leq \beta \leq 2\alpha$, kaj la normala kondiĉo devigas

$$\int_0^{2\alpha} \mathcal{P}(\alpha, \beta)\mathrm{d}\beta = 1. \tag{1}$$

*teixeira@cbpf.br

Ni montros ke

$$\mathcal{P}(\alpha,\beta) = 2\kappa \sin\beta \Big[\sin^{-1}\left(\frac{(\cos\alpha+\cos\beta)\sqrt{\cos\beta-\cos(2\alpha)}}{\sin\alpha(1+\cos\alpha)\sqrt{1+\cos\beta}}\right) + (1-2\cos\alpha)\cos^{-1}\left(\frac{\cos\alpha\sin(\beta/2)}{\sin\alpha\cos(\beta/2)}\right)\Big]. \tag{2}$$

Numeraj kalkuloj forte sugestas valoron $1/\kappa = 2\pi(1-\cos\alpha)^2$, sed ni ankoraŭ ne sukcesis analitike montri tion.

3 Solvo de problemo

Ni hazarde elektas punkto P en la kaloto. La probablo ke P estas je angula distanco inter γ kaj γ+dγ de la centro O de la kaloto estas proporcia al sinγ. Certe $0 \le \gamma \le \alpha$.

Nun ni hazarde elektas novan punkton Q en la kaloto. La probablo ke Q estas je angula distanco β de P estas proporcia al la arko de cirklo (kun radio sinβ) kun centro P, kaj tute entenata en la kaloto. Vidu bildon 1.



Bildo 1 a. *Kiam $\alpha > \beta+\gamma$, la* locus *de punkto Q estas cirklo $2\pi\sin\beta$ longa.*
b. *Kiam $\alpha < \beta+\gamma$, la* locus *de Q estas arko de cirklo $2\delta\sin\beta$ longa.*
c. *En la sfera triangulo OPR validas ekvacio* (3).

Se 2δ estas la angulo de la arko, ni havus

$$\cos\alpha = \cos\beta\,\cos\gamma + \sin\beta\,\sin\gamma\,\cos\delta. \tag{3}$$

La kunmeta probablo, de P esti en γ **kaj** Q esti en β, estas

$$\mathcal{P}(\alpha,\beta,\gamma)\mathrm{d}\beta\,\mathrm{d}\gamma = \kappa\Big[2\pi\Theta(\alpha-\beta-\gamma) + 2\delta\Theta(\beta+\gamma-\alpha)\Big]\,\sin\beta\,\sin\gamma\,\mathrm{d}\beta\,\mathrm{d}\gamma; \tag{4}$$

tie Θ estas la ŝtupo funkcio kun valoroj 0 kaj 1. Devas okazi

$$\int_0^\alpha \mathcal{P}(\alpha,\beta,\gamma)\mathrm{d}\gamma = \mathcal{P}(\alpha,\beta), \tag{5}$$

kaj la konstanto $\kappa(\alpha)$ devos fari veran la (1).

Ni unue studas la cirkonstanco $\beta < \alpha$. Ni kalkulu

$$\mathcal{P}(\beta<\alpha) = 2\kappa\pi\sin\beta\int_0^{\alpha-\beta}\sin\gamma\mathrm{d}\gamma \tag{6}$$

$$+\,2\kappa\sin\beta\int_{\alpha-\beta}^{\alpha}\sin\gamma\cos^{-1}\left(\frac{\cos\alpha-\cos\beta\,\cos\gamma}{\sin\beta\,\sin\gamma}\right)\mathrm{d}\gamma.$$

La unua integralo estas simpla,

$$\mathcal{P}_1(\alpha<\beta)=2\kappa\pi\sin\beta\Big[1-\cos(\alpha-\beta)\Big]. \tag{7}$$

Por kalkuli la duan integralon ni ŝanĝas la variablo $\gamma\to x=\cos\gamma$ kaj skribas

$$\mathcal{P}_2(\alpha<\beta)=2\kappa\sin\beta\int_{\cos\alpha}^{\cos(\alpha-\beta)}\cos^{-1}\left(\frac{\cos\alpha-x\cos\beta}{\sin\beta\sqrt{1-x^2}}\right)\mathrm{d}x. \tag{8}$$

Poparta integralado donas

$$\begin{aligned}\mathcal{P}_2(\alpha<\beta)=2\kappa\sin\beta\Big[&x\cos^{-1}\left(\frac{\cos\alpha-x\cos\beta}{\sin\beta\sqrt{1-x^2}}\right)-\cos\alpha\sin^{-1}\left(\frac{x-\cos\alpha\cos\beta}{\sin\alpha\sin\beta}\right)\\&+\frac{1}{2}\tan^{-1}\left(\frac{(1+\cos\alpha\,\cos\beta)(1+x)-(\cos\beta+\cos\alpha)^2}{(\cos\beta+\cos\alpha)\,R}\right)\\&+\frac{1}{2}\tan^{-1}\left(\frac{(1-\cos\alpha\,\cos\beta)(1+x)-(\cos\beta-\cos\alpha)^2}{(\cos\beta-\cos\alpha)\,R}\right)\Big]_{x=\cos\alpha}^{x=\cos(\alpha-\beta)};\end{aligned} \tag{9}$$

tie

$$R:=\sqrt{[x-\cos(\alpha+\beta)][\cos(\alpha-\beta)-x]}. \tag{10}$$

Ni substituas limitojn de integralado kaj adicias la $\mathcal{P}_1(\alpha<\beta)$ de (7), kaj fine findas la (2).

Nun ni studu cirkonstancon $\beta>\alpha$. La denso de probablo venos el

$$\mathcal{P}(\beta>\alpha)=2\kappa\sin\beta\int_{\beta-\alpha}^{\alpha}\sin\gamma\cos^{-1}\left(\frac{\cos\alpha-\cos\beta\,\cos\gamma}{\sin\beta\,\sin\gamma}\right)\mathrm{d}\gamma. \tag{11}$$

Rimarku ke (11) estas simila al la dua integralo de (6). Do ni denove ŝanĝas variablon $\gamma\to x=\cos\gamma$, kaj denove poparto integralado donas esprimojn (9) kaj (10). Ni simpligas ĉiujn esprimojn, nun kun $\beta>\alpha$, kaj findas ke (2) estas ankoraŭ valida.

Kiam α estas tre malgranda okazas, el (2),

$$\mathcal{P}(\alpha\to0,\beta)=\frac{8}{\pi\alpha}\frac{\beta}{2\alpha}\Big[\cos^{-1}\frac{\beta}{2\alpha}-\frac{\beta}{2\alpha}\sqrt{1-(\beta/(2\alpha))^2}\Big]; \tag{12}$$

tie ni konsideris $\kappa=2/(\pi\alpha^4)$. Ĉi tiu estas la bone konata rizulto por plana disko [2]. Kaj kiam $\alpha=\pi/2$, kaloto estante la tuta duonsfero, ni havas

$$\mathcal{P}(\pi/2,\beta)=(1-\beta/\pi)\sin\beta. \tag{13}$$

Vidu bildon 2.



Bildo 2 *Denso de probablo* $\mathcal{P}(\alpha, \beta)$*, por pluraj fiksaj valoroj de* α*:* $90^o, 75^o, 50^o, 1^o$.

Ekvacio (2) estas skribata pli simple se ni difinas

$$\varphi := \cos^{-1}\left(\frac{\cos\alpha}{\cos(\beta/2)}\right): \tag{14}$$

$$\mathcal{P}(\alpha,\beta) = 2\kappa \sin\beta\Big[\sin^{-1}\left(\frac{(\cos\alpha+\cos\beta)\sin\varphi}{\sin\alpha(1+\cos\alpha)}\right) + (1-2\cos\alpha)\cos^{-1}\left(\frac{\sin(\beta/2)\cos\varphi}{\sin\alpha}\right)\Big]. \tag{15}$$

Nur kalotoj kun $\alpha < \pi/2$ evitas la ekvatoran regionon de lakta vojo. Sed tutĉiela studoj jam okazis [3], kun

$$\mathcal{P}(\pi,\beta) = \frac{1}{2}\sin\beta. \tag{16}$$

4 Agnoskoj

Dankoj estas devataj al kolego Armando Bernui, por prezenti al ni la ĉi tiun problemon. Ni ankaŭ ŝuldas kolegon James R Piton, por amika helpo pri bibliografio en la reto, kaj al http://purl.org./NET/voko/revo/ por netaksebla lingva helpo. Informatikaj programoj Maple, Corel, PCTeX, kaj eps.fig, estis uzataj por fari ĉi tiun artikolon; ni volas kore danki al ĝiaj kreintoj, same al ekipo de Microsoft kaj Arxiv/LANL.

References

[1] A Bernui kaj T Villela, *A method to search for topological signatures in the CMBR angular distribution*, en redaktanta fazo.

[2] A F F Teixeira, *Distances in plane membranes*, physics/0111108.

[3] Evelise Gausmann, *Polarização da luz e outros efeitos em universos multiplamente conexos*, Tese de Doutorado, Instituto de Física Teórica, Universidade Estadual Paulista; IFT-T.005/00 (2000).